RADIO HABANA CUBA
Artículo Editado por Maritza Gutiérrez González
18/07/2019 07:59:02

Pli ol 5 mil instruistoj esprimis sian volon reveni al la klasoĉambroj

Havano, 18 jul (RHK) Ena Elsa Velázquez, ministrino pri edukado, sciigis per la socia reto Twitter, ke post la sciigo pri la salajra altigo en la subvenciata sektoro, pli ol 5 mil instruistoj petis realiĝi al la laboro en klasoĉambroj.

Ŝi sciigis ke “la petoj okazas en la municipaj organoj de edukado. Ke instruistoj spertaj kaj kvalite laborpretaj reaniĝu, favorigasl la docentan anaron, ŝi aldonis.

La informo estis amplekse komentita en ciferecaj komunikiloj kaj ĝenerale oni taksas tion kiel bona novaĵo, kaj estas “taŭga respondo de la instruistoj al la kuraĝa decido adoptita de la registaro kaj la Revolucio,“ raportas la gazeto Granma.

La docenta anaro estas temo ĉiam prioritata de la ministerio pri edukado. La pasintan junion, la doktorino Velázquez-Cobiella, anoncis ke la 94% de la bezonoj pri instruistoj estis certigitaj.

La ceteraj bezonoj estus kovritaj per instruistoj dungotaj per kontraktoj, kaj aliaj laborantaj en aliaj sektoroj, plus help-lernantoj.